

Memortago de la fino de la okinava batalo

La 23an de junio 2019

La 23an de junio okazis la ceremonio por konsoli animon de militmortintoj en la batalo de Okinavo en la Pacpreĝa Parko en la urbo Itoman kun la ĉeesto de 5100 homoj. En tiu batalo en 1945 mortis pli ol 240 000 homoj, el kiuj duono estis loĝantoj de Okinavo.

Kiel finiĝis la okinava batalo?



Por la tiama japana registaro la plej grave estis protekti la imperiestron kaj ĝian reĝimon, ne protekti la popolanojn. Por tiu celo la registaro bezonis tempon por negoci kun la aliancaj regnoj, ĉefe kun Usono, kaj ne deklarinte sian kapitulacion, ĝi ordonis al sia armeo en

Okinavo kontraŭbataladon. Okinavo estas malgranda insularo. Ĝin ĉirakaŭis kaj bombardadis la batalŝipoj kaj aviadiloj, sekve ne nur soldatoj, sed ankaŭ loĝantoj suferegis kaj viktimiĝis. La 23an de junio 1945, la komandanto Uŝijima Micuru, ne plu havante esperon pri organiza kontraŭbatalado,

sinmortigis per la japana tradicia maniero harakirio, postlasis jenan ordonon al siaj soldatoj.

Karaj soldatoj, vi bataladis jam 3 monatojn kaj plenumis vian taskon. Via lojala kaj brava batalspirito brilados eterne en la posta mondo. Nun nia flanko estas en kaoso, perdinte interkomunikadon, sekve ne eblas komandi vin. Ekde nun vi restu ĉe via bazo kaj batalu sub la komando de via suprulo ĝis la fino. Adiaŭon. Tiu ĉi ordono estas la lasta. Vi ne havu malhonoron kiel kaptitoj, sed vivu sub la eterna moralo.

Uŝijima forĵetis sian respondecon kaj ordonis pluan bataladon al la soldatoj. Tiu ĉi tago, la 23a de junio 1945, fariĝis la oficiala fino de la okinava batalo, sed laŭ lia ordono soldatoj plu bataladis ĝi septembro. Dum la milito la gvidantaro ofte uzis tiun frazon “Vi ne havu malhonoron kiel kaptitoj, sed vivu sub la eterna moralo” al siaj soldatoj, kiu signifas “batalu ĝis morto por la imperiestro”. Tiu ĉi frazo havis grandan influon al la soldatoj. Ili devis elekti senutilan morton ol esti kaptitaj. Tiamaniere viktimoj multiĝis. Sur la cenotafo de Iŝiji estas engravuritaj pli ol 240 000 nomoj, inkludante multajn okinavajn loĝantojn, usonajn kaj britajn soldatojn.

Deklaro de la guberniestro kaj la ĉefministro

En la ceremonio komence deklaris Pacdeklaron la guberniestro Tamaki.

Jam pasis 74 jaroj post la fino de la okinava batalo, sed en Okinavo havanta nur 0,6% de la tuta japana tereno estas 70,3% de la usonaj militbazoj ekzistantaj en Japanio. Tiuj grandegaj militabazoj estas grandega malhelpo al la progreso de Okinavo.

Dum 47 jaroj post la unuiĝo de Okinavo al Japanio okazadas krimoj, akcidentoj, bruoj ktp., kiuj estis kaŭzitaj de la garnizonanta usona armeo. Vi rememoru, ke en tiu ĉi aprilo okazis tragedia krimo fare de soldato de la usona mararmeo.

Malgrandigo de la usonaj militbazoj kaj revizio de malegala konvencio inter Japanio kaj Usono pri la usona armeo en Japanio estas grava devo de ambaŭ landoj.

Pri la nove konstruota militbazo Henoko loĝantoj de Okinavo ripete montras sian kontraŭan opinion en la elektoj kaj referendumo, sed la registaro ignoradas tiun opinion kaj plu antaŭigas la konstruadon. Ĝi ne respektas la opinion de Okinavo, kiun Okinavo prezentis laŭ la demokratia proceduro, kaj atencas nian aŭtonomian rajton. Mi forte postulas, ke ĝi reduktu danĝeron de la aerodromo Henoko kaj rezignu konstruadon de la militbazo Henoko.

Okinavo estas “lando de moralo”, kiu celas pacon. Ni okinavanoj dissendos nian pacan koron al la mondo surbaze de la heredita paca kulturo. Ni volas ludi gravan rolon por efektiviĝi eternan pacon en la mondo.

Poste la ĉefministro Abe parolis, sed lia parolado estas ŝablona kaj tute ne emociis la aŭskultantojn. Li eĉ ne menciis pri la konstruado de la militbazo Henoko. Se li

vere kredas, ke la konstruado utilos por Okinavo, li devis klarigi tion al la okinavanoj, sed li ne faris tion. Li rapide kaj mallonge parolis. Ŝajnis al mi, ke li volas plej rapide eskapi el tiu ceremonio. Fine de lia parolado aŭdiĝis multaj riproĉoj kaj kritikoj el la ĉeestantoj, ekzemple “Mensogulo!” kaj “Ĉesigu la konstruadon!”. En tia ceremonio neniam aŭdiĝas tiaj riproĉoj krom en Okinavo, kio signifas la grandan koleron de okinavanoj al la ĉefministro kaj la registaro.

Poemo de knabino



Deklamis sian poemon Jamauĉi Rena, lernantino en la 6a lernojaro de la elementa lernejo Kanegusuku. Ŝia poemo estis elektita el 1098 poemoj. Ĉiun jaron poemoj de geknaboj en la ceremonio emocias la aŭskultantoj. Mi jam kelkajn fojojn tradukis tiujn poemojn en Esperanto. Jen ŝia poemo:

Vera feliĉo

Tre bela blua maro,
kiun pejzaĝon vidis tiu maro?
Multe bombarditajn urbojn?
Ruĝe flamantajn urbojn?

Ĉu ĝi ne vidis tian Okinavon?

Tre verdaĵplena tero,
kiun voĉon aŭdis tiu tero?
Eksploĉajn bruegojn?
Plorkriantajn bebojn?
Batalkampojn kun krioj de soldatoj kaj kuglobruoj?
Ĉu ĝi ne aŭdis tian Okinavon?

La klara, blua ĉielo,
tiu ĉi ĉielo,
kion vi pensis?
Pro la insuloj sen verdaĵoj, sen urboj, sen espero,
pro la tremado de la koro kaj la korpo,
pro la perdo de sennombraj valoraj vivoj,
tion sciante, ĉu ĝi ne ploris por Okinavo?

En la erao Heisei mi naskiĝis.
Nur tre belan bluan maron
nur tre verdaĵplenan teron,
nur tre klaran bluan ĉielon,
mi konas.
Multiĝas homoj, kiuj ne scias,
kion la maro, la tero kaj la ĉielo vidis,
kion ili aŭdis,
kion ili pensis.

Kvankam ni ne spertis la militon,
estas nia devo transdoni la mizeron kaj la lecionon,

ke militoj ne ripetiĝu,
por ke homoj ne plu ploru malĝoje
por ke tiu ĉi insularo kaj la mondo estu feliĉaj.

Fariĝi riĉaj,
fariĝi famaj
ne signifas fariĝi feliĉaj.
Ĉiun tagon vivi kun ridoj kun familianoj kaj amikoj
estas vera feliĉo.
Havi revon por la estonteco
estas la plej granda feliĉo.

“Vivo estas trezoro”,
ni vivas, tial ni povas ridi,
ni vivas, tial ni havas estontecon.

La nova erao Reiŭa komenciĝis
kun espero por la morgaŭo,
Tiu ĉi feliĉo daŭru eterne.

*Erao Heisei: ekde 1989 ĝis aprilo 2019. Dum tiuj jaroj la imperiestro Akihito estis sur la trono. Li detroniĝis pro maljuneco en aprilo 2019, kaj nova erao Reiŭa komenciĝis en majo kun la nova imperiestro Naruhito.